

Matthias Claudius,

Vespera kanto

tradukita de Otto Bonte

1. La luno jam leviĝis,
 Steletoj ekheliĝis,
 Ravante homojn nin;
 Silentas la arbaro
 Kaj super la kamparo
 Nebulo pala levas sin.

2. Ho, mondo la kvieta,
 Kaj kiel ŝajnas eta
 Krepuska en kovril';
 Por ke vi en ĉambreto
 Samkiel infaneto
 Senzorge dormu en lulil'.

3. Rigardu nun la lunon,
 Vi vidas nur duonon,
 Sed tamen ronda ĝi.
 Ni ofte ion ridas,
 Ĉar ni ne klare vidas,
 Ke ĉie regas harmoni'.

4.

...

5.

.....

.....

.....

.....

.....

6.

.....

.....

.....

.....

.....

7. Ekkuŝu nun, gefratoj,
De bona Di' ŝirmataj
Kun tuta la homar'.
Kar-Dio ne nin punu,
Trankvilan dormon donu
Kaj al malsana la najbar'!

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de MATTHIAS CLAUDIUS (*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de Otto Bonte.*

Arg-394-779 (2007-03-26 22:31:58)

Tiu ĉi traduko estas publikigita en 1984 en "Esperanto aktuell", la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj "Flavaj paĝoj", sur paĝo 15 de la numero 6/984. Mi, Manfred Retzlaff, detajpis la tradukon el tiu, en 2007-03-26. Enigis la tradukon de Otto Bonte d-ro Dirk Willkommen, la tiama redaktisto de "Esperanto aktuell",

.